


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ elokuu ♦ aŭgusto ♦ 4/2003



(Kuva/
Foto: amr)

Markku Saastamoinen osallistui YK-liiton kurssille. Kotimatkalle mukanaansa hän sai hyvän tunnelman ja kansainvälisyysmateriaalia. (s. 10)

Markku Saastamoinen partoprenis kiel EAF-reprezentanto en kurso de la UN-asocio. Hejmenvojaĝante lin akompanis bona etoso kaj internaciecmaterialo.

Aŭtunaj Tagoj, p. 13 ♦ Muut lehdet, s. 22

Al kvalita komunikado, p. 8 – Laatu viestintään, s. 10

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittajaa etsitään, yhteydenotot puheenjohtajalle (Anna Ritamäki, yhteystiedot alla)

Ĉefredaktoro serĉata, kontaktu la prezidanton (Anna Ritamäki, kontaktinformoj sube)

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhint/Prenumerationspris/Abonprezo: 15 •/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 •; Baltio 10 •, aliaj landoj 13,50 •.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Anna Ritamäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihteer: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Eila Martin, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

Synnöve Mynttinen, Koskenniskantie 5 D 39, 48400 Kotka. ☎ (05) 260 1326

Jukka Noponen, Viipurinkatu 27 A 12, 00520 Helsinki. ☎ (040) 5915767 ☎ (09) 1483871 ✉ jukka.noponen@iki.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

Eero Rinta-Karjanmaa, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ tgrundstrom@

www.lailanet.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Officejo/Toimisto: Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Ĉiutaga krea historio – kontribuoj al vivanta fenomeno

Ni ĉiam staras meze de historio. Ĝian komenciĝon ni ne scias, ankaŭ ne ĝian finon, sed ĉiutage ni vivas ĝin, kontribuas eron al la pasinteco de la estonteco.

Planante la Aŭtunajn Tagojn de EAF en Raŭmo min trafis tiuj pensoj. Tie ni lanĉos nian projekton *Al kvalita komunikado*, kiu celas plialtigon de la kvalito de nia informa agado. Tie ni provos reiri al la etoso de antaŭ 23 jaroj. Tie ni konatiĝos kun tre aktiva informanto. En ĉio fluas historio.

Agadi projektoforme estas moda metodo, sed sen la laboro de la antaŭaj generacioj ni ne havus ion pri kio informi, kaj certe ne ion tiom kvalitan kiel la nuntempa esperanton, ĉiutage evoluanta lingvon.

La belartajn konkursojn oni okazigis jam dumlonge antaŭ la publikigo de la Raŭma manifesto, sed eble la ideoj pri la valoro de nia kulturo donis al ni la kuraĝon dissendi gazetaran komunikon pri la sukcesoj de *Jukka Pietiläinen* (eseo pri historio de nia literaturo) kaj *Anja Karkiainen* (poezio). Sekve multegaj gazetoj publikigis noticon de la Finna noticburoo (STT/FNB).

Sen *Dafydd ap Fergus* eble ne aperus ĉi-somere kvin paĝoj pri esperanto en la brita *The Guardian* antaŭ la kongreso. Eble sen li poste ne aperus unu paĝo en la usona, sed tutmonde legata, novaĵmagazino *Newsweek*. Aliflanke estas same verŝajne ke la laboro de *Dafydd* kaj de lia kolego *Marko Naoki*

Lins en la Brusela Komunikadcentro ne kontribuis al tiuj artikoloj kaj al la amuziĝemantuziasma tono de *Newsweek*: “A lingo developed by a 19th-century idealist is back in fashion” – La lingvaĵo ellaborita de 19a-jarcenta idealisto ree estas moda ... Tamen en la nova anglalingva libro kontraŭ nuranglalingva Eŭropo aperinta ĉe la eldonejo Routledge aperas pruveblaj ŝpuroj de la agadoj de *Dafydd*, citaĵo de liaj vortoj kaj referencoj al informoj de li kolektitaj ĉe la retpaĝo de Eŭropa Esperanto-Unio (www.lingvo.org).

Niajn gravajn sukcesojn kaj malsukcesojn ni ne povas atribui nur al konkretaj personoj. Eble *Turun Sanomat* publikigis artikolon pri la kostoj de komuna lingvo ne nur pro la propono de *Anna-Liisa Ali-Simola* sed ankaŭ pro la insista laboro, kiun faris *Irja Klemola* antaŭ jardekoj – aŭ pro malnova vortaro kuŝanta sur breto de ies subtegmentejo. Ni ne povas ĉion kompreni.

Planante la Aŭtunajn Tagojn de EAF en Raŭmo min trafis la sento de partopreno en io granda. Vole-nevole ni ĉiuj kontribuas al la vivanta fenomeno esperanto.

Ĝis 13-14 septembro en Raŭmo, ĝis la trejnseminario en Jyväskylä aŭ ĝis venonta retmesaĝo aŭ gazeto ... ĝis sekva kunkreo de nia historio!

Anna Margareta

UK kun gazetara atento kaj prioficejaj diskutoj

La Universala Kongreso en Gotenburgo allogis grandan amaskomunikilan atenton en la kongresa lando kaj eĉ redaktorino de la granda novaĵmagazino Newsweek vizitis kaj verkis artikolon. La rezultoj de la belartaj konkursoj instigis ankaŭ la gazetaron en Finnlando interesiĝi post la kongreso.

La kongreso pasis kiel kutime kun artaj prezentoj, prelegoj kaj diversaj kunsidoj. Kunsidis interalie la komitato de UEA kaj la komitato de Eŭropa Esperanto-Unio.

En pluraj kunsidoj estis diskutita la situacio de la Centra Oficejo, sed tamen estis malfacile formi al si klaran bildon pri la situacio. Venis multaj plendoj ekzemple pri la malfruo de la konteltiroj. Ĝenerale eblas diri ke la diskutoj estis multe pli malfermaj ĉi-jare ol dum la pasintjara kongreso en Fortalezo.

Tre grava decido pri la oficejo estis farita en la komitatkunsido. La asocio investos ĝis maksimume 300 000 eŭrojn en la renovigon de la domo en Roterdamo. Per tiu la spekulado pri la translokiĝo de la CO povas esti finita. La propono pri TEJO-oficisto tamen ne estis akceptita. Ioman komprenon pri la bezonoj de TEJO la komitato tamen volis montri petante ke unu de la konstantaj oficistoj estu nomumita respondeca pri TEJO. Se tio funkcios la junulara asocio almenaŭ scios kun kiu trakti pri siaj malfacilaĵoj, ekz. pri ricevado de poŝtaĵoj kaj aliaj bazaj administraj servoj.

La estonto de la Brusela Komunikadcentro restas malklara, sed estas alvoko kolekti



donacojn de unuopuloj kaj organizaĵoj ĝis oktobro kiam verŝajne la sorto de la agado estos decidita. En Aŭtunaj Tagoj de EAF la estro de BKC prezentos la agadon, kiu jam portis signifajn fruktojn en formo de iniciatoj en la Eŭropa parlamento kaj en la gazetaro.

atoj en la Eŭropa parlamento kaj en la gazetaro.

En la malferma kunsido de la Elekta komisiono estis menciitaj pluraj nomoj kiel eblajn estontajn prezidantojn de UEA. Unu de la nomoj menciitaj estas Osmo Buller, sed ankoraŭ ne ekzistas formalaj kandidatigoj por la nova estraro, kiu estos elektita en Pekino sekvajare.

En la sekva numero de Esperanta Finnlando vi povos legi pli pri la kongreso. (*amr*)

Rezolucio de la 88-a Universala Kongreso de Esperanto

La 88-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Gotenburgo, Svedujo, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2003, en ĉeesto de 1800 personoj el 62 landoj, kaj traktinte la temon “Lingvaj rajtoj kaj respondecoj”

atentigas pri la pluraj iniciatoj kaj deklaroj de Universala Esperanto-Asocio en lastaj jaroj pri la konservado de lingva pluralismo ene de statoj kaj en la rilatoj inter statoj, kaj pri la rolo, kiun la Internacia Lingvo Esperanto povas ludi kiel efika kaj neŭtrala ponto inter la diversaj lingvoj;

notas en tiu rilato ekzemple la Manifeston de Prago (1996) pri lingva demokratio, kaj rezoluciojn de Universala Kongresoj de Esperanto en Zagreb, Kroatio (2001), kaj Fortaleza, Brazilo (2002);

konstatas,

– ke lingvoj plenumas fundamentan rolon en homaj socioj ne nur kiel ilo de komunikado sed ankaŭ kiel manieroj por esprimi sian identecon;

Sukcesa junulara kongreso

La ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazinta en Lesjöfors (Svedio) kunigis preskaŭ 230 partoprenantojn. Okazis interesaj prelegoj kaj ardaĵaj diskutoj pri la temo “Al Libera Kulturo”, koncertoj, konkursoj, kursoj, ekskursoj ktp. IJK kiel ĉiam estis tre bunta, laŭta, sendorma kaj etosega!

Dum la kunsidoj kadre de la IJK en Svedio, la TEJO-komitato elektis la novan TEJO-estraron, kies oficperiodo finiĝos en la jaro 2005. La estraron eniris:

- Bertrand Hugon, Francio (prezidanto)
- Sonja Petrovic, Jugoslavio (vicprezidanto, KER, rilatoj kun UEA)
- Aleks Kadar, Francio (ĝenerala sekretario)
- Katja Ignatieva, Rusio/Svedio (financaj aferoj kaj subvencioj)
- Jevgenij Gaus, Litovio (informado)

El la aliaj decidoj de la komitato menciindas la akcepto de propono starigi retan oficejon de TEJO (flanke de la komitato respondecas David-Emil Wickstrom). Pri la estonteco de

la paperaj gazetoj “TEJO Tutmonde” kaj “Kontakto” ne rezultis klara decido: oni plu esploras diversajn variantojn de ilia eldonado.

La fama bando Dolcxamar de Finnlando ŝanĝis sian nomon al Dolchamar (de *cx* al *ch*, daŭre sen supersigno) kaj dum la kongreso koncertis novstile en nova konsisto.

La internacian lingvokurson okazigitan lige al la kongreso partoprenis 15 personoj.

Se vi iros al la retpaĝo <<http://www.tejo.org/ijk/>> vi povos konatiĝi kun statistiko pri la kongreso kaj trovi ligojn al fotopaĝoj.

Kaj ĝis la venonta IJK: en Rusio!

La raporto estas bazita sur informoj de TEJO-AKTUALE – Senpaga informletero de TEJO kaj informoj ricevita dum UK de partoprenintoj. Arĥivo de TEJO-aktuale troviĝas ĉe <<http://www.tejo.org/tejo-aktuale/>>. Por aboni sendu mesaĝon al <majordomo@esperanto.org> kun la enhavo: subscribe tejo-aktuale (*amr*)

– ke lingva diverseco reprezentas unu el la grandaj riĉaĵoj de la homa kulturo kaj estas konservenda en la kunteksto de demokratia lingvopolitiko, kaj ke tia politiko ankaŭ liveras la lingvajn rimedojn ne nur por komunikado ene de socioj, sed ankaŭ inter la socioj;

– ke lingvaj rajtoj – nome tiuj rajtoj, kiuj rilatas al la kontentigo de komunikbezonoj kaj la esprimado de identeco en plurlingvaj situacioj

– estas esenca sed tro ofte neglektata elemento en la fundamentaj homaj rajtoj;

– ke la realigo de lingvaj rajtoj estas afero ne nur jura sed ankaŭ morala, en kiu ĉiu havas respondecon partopreni;

– ke tiuj rajtoj aplikiĝas, aŭ devus aplikiĝi, je ĉiuj niveloj de la homa socio, ekde la rajtoj de individuoj tra la protektado de lingvaj malplimultoj ĝis lingva egal-eco en la rilatoj inter statoj;

– ke la principoj de egalrajteco kaj de demokratia komunikado postulas konservadon de la lingva diverseco en multlingvaj komunumoj, en la kadro de egaleca kaj klara lingvopolitiko, ĉar tio ebligas maksimuman socian partoprenon de ĉiuj civitanoj;

– ke manko de klara kaj aktiva lingvopolitiko malfermas la vojon al lingva dominado kaj hegemonio;

– ke eblas konservi lingvan diversecon, precipe en interstataj rilatoj, nur per aktiva lingvopolitiko cele al realigo de neŭtrala multlingvismo, en kiu neniu lingvo havas dominan rolon;

atentigas pri la multjaraj spertoj de la Esperantlingva komunumo kiel modelo de egalrajta komunikado en multlingva socio kaj pri la preteco de tiu lingvo por ludi multe pli aktivan rolon kiel pontolingvo en la rilatoj inter statoj kaj en multlingvaj sistemoj de komunikado,

petas la diversajn Esperanto-organizaĵojn, je internacia, nacia kaj loka niveloj, kunlabori en sistema klop- ▷

Esperantokurso en Valamo julie 2003

La ĉi-jara kurso, kiu okazis inter la 14a kaj 18a de julio, ricevis apartan atenton en amas-komunikiloj. En Helsingin Sanomat aperis la 17an de julio artikolo sub la titolo *Esperanto logis svison Charly Knuchel al Valamo*. La raportisto Satu Konttinen partoprenis la elementan kurson lunde-marde kaj skribis ankaŭ pri propraj spertoj kiel lernantino.

Plejparto de la kursanoj alvenis jam dimanĉe kiel ankaŭ la instruistoj, kiuj estis ĉefinstruisto Atilio Orellana Rojas kaj helpins-

truisto & kursorespondeculo Tiina Oittinen. La kurson partoprenis 9 gelernantoj. De ili 6 estas el Finnlando, 1 el Svislando (Charly Knuchel) kaj 2 el Rusio (Aleksy Sabirov kaj Julia Sabirova). Krome la kurson vizitis kiel dirite la raportisto de HS lunde-marde kaj la fotisto lunde, Anja Karkiainen lunde, Carola Antskog lunde-marde kaj Terhi & Jukka Laaksonen merkrede-vendrede. Ankaŭ Pentti Makkonen videblis en Valamo dimanĉe kaj vendrede prizorgante veturigadon



Timo Väänänen, Seija Mannila, Jenni Pölkki kaj Pauli Roinila. (Foto: Jukka Laaksonen)

▷ do atentigi pri la kvalitoj de la Internacia Lingvo Esperanto, kaj konservi kaj evoluigi la lingvon tiel ke ĝi plej bone ludu sian rolon kiel transponta lingvo en multlingvaj situacioj,

kaj alvokas al ĉiuj internaciaj organizaĵoj registaraj kaj neregistaraj, al registaroj kaj aliaj instancoj, al faku-

loj kaj sciencaj organizaĵoj, kaj al ĉiuj civitanoj, kiuj deziras konservi kaj fortigi lingvan egalecon je ĉiuj niveloj, pli profunde esplori la kapablojn kaj atingojn de la Internacia Lingvo Esperanto en la rilatoj inter lingvoj kaj popoloj ĉie en la mondo kaj apliki ties lingvajn rimedojn.

de kelkaj kursanoj. Ĉiuj vizitantoj estis bonvenaj gastoj, kiuj kunportis valoran aldonon en la kursa atmosfero. Aparta danko al Jukka L., kiu brave ĉiĉeronis dum ekskursoj kaj al ambaŭ, Terhi & Jukka, kiuj ebligis nian viziton al fumsaŭno merkrede.

Kvar de la kursanoj (kaj la raportisto lunde-marde) partoprenis la elementan kurs-nivelon kaj kvin la progresantan. Ambaŭ de la instruistoj instruis ambaŭ grupojn laŭ la leciona programo. Tamen evidentiĝis, ke post 3-4 taga studado la kursanoj estis tiel samnivelaj, ke en la lasta tago eblis kunigi la grupojn por la lastaj lecionoj de Atilio. La komencanta grupo estis tre lerta kaj ripetado kaj fortigado de scioj bone taŭgis al la progresantoj.

Ankaŭ la vesperaj kunestadoj estis afablaj kaj lernigaj. Ni ludis lunde sub gvidado de Carola, aŭdis marde prelegon de Atilio pri historio de inkaa muziko, saŭnis en fumsaŭno merkrede kaj bonege manĝis kaj amuziĝis ĵaŭde. Dum la ĵaŭda festa kaj adiaŭa vespero la programo variis de teatraĵeto, kiun la kursanoj prezentis laŭ gvidlinioj de preta teksto, ĝis ludado de violono kaj kantelo kaj dancado. Kaj kompreneble sonis vigla diskutado plejparte esperante, interpretado en la finnan estis uzata nur kiam absolute necesa.

La preparlaboroj por la venontjara kurso jam komenciĝis. La datoj estas 4.-9.7.2004 (de dimanĉo ĝis vendredo). La horaro estas ŝanĝita tiel, ke la kursa programo komenciĝos jam dimanĉe posttagmeze kaj finiĝos vendrede je la 11.30 per lunĉo. Tiamaniere Valamo estos pli bone atingebla ankaŭ per la regula aŭtobuso. Same kiel ĉiujare, ankaŭ la venontjara kurso havos almenaŭ du nivelojn: la komencantan kaj la progresantan. Por la progresantoj estas planita sugesto-

pedia kurso instruita de Atilio samtype kiel dum la kurso 2002. Komencantojn Atilio instruos 1-2 horojn tage, alie ili lernos sub gvidado de Carola kaj Tiina. Se necese, estos formita ankaŭ tria, konversacia grupo.

Pliajn informojn de la venontjara kurso vi ricevos de EAF-kursorespondeculo Tiina Oittinen (kontaktoinformoj sur paĝo 2) aŭ de sekciestro de ELFI Carola Antskog (vidu antaŭlastan paĝon sub ELFI). Finnlandanoj povas bonege kontakti ankaŭ rekte kun Valamo, sed eksterlandanoj prefere kontaktiĝu pere de EAF. (to)

Salutoj el Valamo!

Oni aranĝis esperantokurson en la Popola Instituto ĉe la ortodoksa monaĥejo de Valamo de 14.7. ĝis 18.7.

La kurso estis tre bonega: nun, post la kurso, mi miras multe, kiel oni povis fari aferojn tiel multe dum nur unu semajno... Mi havis tiel multe da novaj spertoj!

Estis mia unua fojo en Valamo kaj tial ĉio estis nova por mi: la ekskursoj al la monaĥeja tombejo kaj al la kruco de la migranto, la fuma saŭno en Kämppä Riski kaj la religia atmosfero de la monaĥejo. Kaj la plej ekzotika sperto por ĉemara raŭmano estis naĝado en lago!

La spirito en la kurso estis tre pozitiva kiel ankaŭ eblecoj lerni Esperanton. La partoprenantaro estis interesa: ĉe-estis inter aliaj unu svi-so, du rusoj kaj raportisto de Helsingin Sanomat!

La lecionoj estis tre bonaj, ĉar ni ne parolis pri gramatiko, sed ni pritraktis esperantlingvajn artikolojn kaj dum lecionoj oni devis skribi kaj paroli nur esperante, ĉar la eksterlandaj kursanoj kaj instruisto ne komprenis finnan lingvon.

Fine mi volas diri, ke la kurso estis tre bone aranĝita kaj mi sentis min tre hejmece dum la tuta kurso.

Paula Niinikorpi

Esperantistoj inter geamikoj en interkultura konferenco

Du esperantistoj troviĝis inter la kvincento da partoprenantoj en la angla-lingva unesco-konferenco pri interkultura edukado en Jyväskylä 15-18 julio 2003: mi, prezidanto de EAF kaj Radojica Petrovic, kiu tiam estis estrarano de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. (Dum la ĵusa ILEI-konferenco en Svedujo li elektiĝis ILEI-prezidanto.) Dafydd ap Fergus, kiu ankaŭ anonciĝis por la konferenco, jam kelkajn monatojn antaŭe informis ke li ne povos ĉeesti. Mian partoprenon financis la EAF-projekto *Al kvalita komunikado*.

Mi ĉeestis kiel simpla partoprenanto, Radojica kiel prezentanto nome de la universitato kie li laboras. Okazis centoj da tiaj prezentoj, kvarope grupigitaj dum duhoraj sesioj. Multaj sesioj okazis paralele, sed estis mirinde facile elekti por si interesajn ĉar la sesioj estis ordigitaj laŭ diversaj temoj.

Interkulturo revekiĝas

Radojica parolis pri la projekto Interkulturo, kiu dum la pasintaj jaroj dormis, sed kiu nun relanĉiĝos (en interreto ĉe www.interkulturo.net) per iom alia koncepto. ILEI kunlabore kun la nova faka sekcio de TEJO Esperanto@Interreto kombinas la interŝanĝon inter lernejoj per trejnado de la gvidantoj. La unua trejnseminario okazis paralele al la ĉi-jara ILEI-konferenco.

Ĉirkaŭ 20 personoj partoprenis la konferencan sesion dum kiu Radojica prezentis Interkulturon. Tio estis kutima kvanto, kaj la intereso estis granda. Aliaj interrete agantaj interkulturistoj esprimis similajn problemojn, malfacilaĵojn pri



la daŭra pluteno de la diversaj kontaktoj, miskomprenoj inter agantoj en diversaj landoj, mezurado de rezultoj k.s. Interkulturo ofertis interesajn metodajn solvojn kaj certe povos utiligi metodojn jam ellaboritajn de aliaj. Formiĝis utilaj kontaktoj. La fakto ke esperanto estis uzita en Interkulturo ne alvokis apartan miron. Tio prezentiĝis kiel grava parto de la koncepto, tute nature. La problemo de lingvo-elekto estis menciita ankaŭ de la aliaj prezentantoj.

En la kompaktdisko de la konferenco, kie ĉiuj prezentotekstoj estas publikigitaj, aperas prezentiĝo de Interkulture de Radojica Petrovic kaj

Mauro La Torre.

Esperantistoj kaj aliaj interkulturistoj

Ni ne multe reklamis esperanton, sed ni ja uzis ĝin inter ni kaj la nomo Esperanto-Asocio de Finnlando aperis ĉe mia nomo en la listo de partoprenantoj. Aliajn esperantistojn ni ne renkontis. Tamen tuj ĉe la hotela akceptejo iu demandis nin pri la parolata lingvo. Mi, Radojica kaj Seija de Jyväskylä konatiĝis kun skota virino loĝanta en Kanado kiu same kiel Radojica okupiĝas pri interkultura edukado en interreto. Ŝi konatiĝis kun esperanto jam dum la infanaĝo pro iu parenco, sed poste trovis ankaŭ kurson rete kaj iomete konatiĝis. Nun ŝi unuafoje vere aŭdis kaj vidis ke la lingvo estas vivanta kaj uzata nature.

Poste dum la konferenco mi ĉeestis prelegon pri lingvopolitiko en Bangladeŝo. Parolis Hakim Arif, kiu bedaŭris la superregon de la angla kaj

eĉ menciis la bedaŭrindan nedisvastiĝon de esperanto. Evidente li havis pozitivan senton pri esperanto, sed ne aktualajn informojn.

Kiam venis tempo por demandoj kaj komentoj mi informis pri la ĉeesto de io kio povas ŝajni nerealaĵo: la ĉeesto de la prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando. Tiel enkondukante mi klarigis ke ja esperanto estas uzata tutmonde, kvankam ĝis nun inter relative malmultaj. Ankaŭ mi substrekis la valoron de konscio pri lingvaj temoj. Tiu konscio ofte mankas, sed estas pli granda en iuj rondoj kaj en iuj landoj, interalie ĝuste en Bangladeŝo. La elekto de la 21a de februaro kiel tagon de la patrina lingvo okazis iniciate de tiu lando, kiu iĝis propra stato ĝuste pro lingva diskriminado suferata dum la reĝo de la tiamaj okcidentpakistananoj. Mi menciis la kontribuon de la esperantomovado kiel lingvokonsciiga movado. Post tiu prelego kelkaj partoprenantoj petis de mi pliajn informojn kaj kun la preleganto mi multe parolis dum la lasta tago de la konferenco.

La al multaj esperantistoj konata Tove Skutnabb-Kangas prelegis pri la valoro de lingva diverseco dum podia diskuto en la ĉefsalono. Ŝi ne menciis esperanton, sed ŝia kontribuo vekis apartan atenton kaj viglan diskuton, kiu montras ke lingvaj temoj nun estas tre aktualaj. En ŝia dika libro pri lingvaj rajtoj troviĝas esperantobiografio kaj ĉi-jare eldoniĝis vaste vendata libro de ŝia edzo Robert Phillipson kun la titolo

English-Only Europe?, kie li rekomendas studi la eblecojn uzi esperanton kiel bazan lingvon en interpretado kaj tradukado en la Eŭropa Unio.

La ĝenerala etoso dum la konferenco estis interkultura, do tolerema, interkompreniĝema. Evidente tiu sinteno validis ankaŭ rilate al esperanto, kiu estis traktita en personaj kafoklaĉaj renkontoj aŭ kiel io interesa aŭ kiel io simple normala. Neniam esprimiĝis iaj negativaj sentoj rilate al la lingvo. Ni sentis nin kunagantoj kun aliaj, valoraj kontribuantoj al interkultura interkompreniĝo niamaniere. Evidente nia deziro estas ke pli da personoj ekkonu ankaŭ nian manieron, sed indas kompreni ke ankaŭ ni multon povas lerni de aliaj.

Necesas rilati al konfliktoj

Mi esperas ke mi lernis ion speciale de unu homo, de la fondinto de moderna pacesplorado Johan Galtung. Li prelegis por la pleno dum la unua tago. Lia parolado estis tre impona, samtempe home humura kaj kuraĝe radikala. Plej bone mi memoras lian diraĵon pri la neblo preventi konfliktojn. Konfliktoj estas enkonstruitaj en homan kunestadon. Necesas rilati al konfliktoj tiel ke ili ne iĝas perfortaj. Eblas trakti konfliktojn pace, aŭskultante komprenstrebe. Tiun konvinkon li kapablis transdoni al sia aŭskultantaro.

Anna Margareta Ritamäki

Nova Esperanto tänään

Estis pretigita nova, ĝisdatigita versio de la informilo *Esperanto tänään*, kiu sufiĉe proksime sekvas la pasintjare de Humphrey Tonkin verkitan novan version de *Ĝisdate pri Esperanto*.

La informilo ekzistas nun en pluraj lingvoj, inter kiuj la finna, ĉe la retejo de EEU: <http://lingvo.org/xx/3/250>

Verŝajne ni aŭtune faros grafike belan version (eble helpe de la CO de UEA por ke ĝi kon-

gruu grafike kun la aliaj lingoversioj) kaj dissendos ĝin al la lokaj kluboj. Dum la kurso en Valamo ĝi jam utilis.

Dum la projekta periodo (Al kvalita komunikado) ni povos publikigi novan version de la informilo. Tiam ni eble povos atenti pri la ideoj alvenintaj dum la projekto kaj eble iom ŝanĝi ĝian aliron, verŝajne ankoraŭ iom pli doni atenton al aferoj en Finnlando. (*amr*)

YK:n vuosituhatavoitteet osaksi kansainvälisyyskasvatusta

Tiistaina 20.5.2003 klo 15.-20.00 Jämsän kristilliselle opistolle kokoontui kaksi kouluttajaa ja seitsemän kurssilaista. Ainoana miehenä joukossa oli Suomen Esperantoliiton hallituksen jäsen Markku Saastamoinen, joka osallistui ”YK:n vuosituhatavoitteet osaksi kansainvälisyyskasvatusta” -koulutustilaisuuteen liittomme *Laatusviestintään* -projektin puitteissa. Hänen tunnelmistaan kertoo hänen kirjeensä YK-liiton Tiina Salmiölle, mutta tässä ensin viralliset tiedot kurssista:

”Oletko kiinnostunut kansainvälisyyskasvatuksesta? Haluatko uusia virikkeitä kasvatus-työhön?”

Koulutustilaisuuksien tavoitteena on motivoi- da järjestöaktiiveja, opettajia ja kasvattajia edis- tämään kansainvälisyyskasvatusta työssään. Teemallisesti pääpaino on YK:n vuosituhat- tavoitteiden tutuksi tekemisessä kansainväli- syyskasvatuksen keinoin. Vuosituhatavoittei- den esittely linkitetään kehitysmaaproblemati- kan, ihmisoikeuksien sekä globaalisaation ja sen

hallinnan käsittelyyn opetustyössä. Koulutuksen aikana globaaleille kysymyksille pyritään löy- tämään yhtymäkohtia myös Suomessa asuvien nuorten arkeen; Miten sinä rakentaisit parem- paa maailmaa? Mitä YK:n vuosituhatavoitteet merkitsevät käytännössä sinulle?

Koulutusmateriaalina käytetään Suomen YK- liiton tuottamaa Minun Afrikkani -opetusvih- kosta ja harjoituskirjaa sekä nuorille suunnat- tua verkkokurssia vuosituhatavoitteista. Kou- lutustilaisuuden runko on rakennettu Suomen YK-liiton Maailmankansalaisen kypsyyskokeen ympärille. Koulutus sisältää alustuksia, mutta pääpaino on pienryhmätyöskentelyssä. Koulutta- jina ovat Eeva-Maria Vuorenmaa ja Tiina Sal- mio Suomen YK-liitosta.”

Kiinnostavatko YK-liiton kurssit ja muut ta- pahtumat muitakin jäseniä? Ottakaa vain roh- keasti yhteyttä Markkuun tai puheenjohtajaan. Maailmassa on monta hyvää tapaa vaikuttaa. Suomen Esperantoliitto on Suomen YK-liiton jäsenjärjestö.

Uudistettu versio tiedotteesta *Esperanto tänään*

Tiedotteesta *Esperanto tänään* on ilmestynyt päivitetty versio. Tiedotteen teksti vastaa pää- piirteissään Humphrey Tonkinin laatimaa uudis- tettua Esperanton maailmanliiton UEA:n tie- dotetta *Ĝisdate pri esperanto*, mutta suomenkie- liseen versioon on lisätty joitakin erityisesti Suo- mea koskevia asioita.

Tiedote on luettavissa usealla kielellä, joukos- sa nyt siis myös suomi, EEU:n nettisivuilta osoitteessa: <<http://lingvo.org/xx/3/250>>

Tiedotteen ulkoasua tullaan myöhemmin syk- syllä muokkaamaan paremmin kopiointiin so- veltuvaan muotoon, jolloin se myös näyttää sa-

manlaiselta kuin tiedotteen muut kieliversiot UEA:n sivuilla. Työn edettyä parannetusta ver- siosta lähetetään yhdistysten yhteyshenkilöille kopio. Tämän hetkistä alustavasti muokattua versiota voi pyytää EAF:n varapuheenjohtajalta Päivi Saariselta (yhteystiedot s. 2).

Laatusviestintään -projektin aikana saatetaan julkaista uusi versio tiedotteesta. Siinä voidaan ottaa huomioon projektin aikana tulleet ideat sekä muutenkin muuttaa tiedotetta entistä pa- remmin Suomen oloihin sopivaksi. Ideat ovat tervetulleita projektiryhmälle ja EAF:n hallituk- sen jäsenille. (*ps, to*)



*Tiina,
Ajellessani tiistai-iltana Mäntän kautta kotiin
Ylöjärvelle läpi kevätvehreän suomalaisen mai-
seman ilta-auringon vähitellen punertuvan ka-
jon peilautuessa tyynten metsälampien pinnoilta
myöhäisen kotiinpalaajan verkkokalvojen kautta
tajuntaan, ymmärsin miten tärkeää olisi jos ih-
miset kaikkialla voisivat vapaasti ilman min-
käänlaista uhkaa kokea samoin.*

*Kiitokset tiistaisesta koulutustilaisuudesta
Teille molemmille.*

*Toimikaamme yhdessä niin, että kevätvehrey-
den kaltainen lupaus paremmasta tulevaisuu-
desta toteutuisi maailmassa tasapuolisesti.*

Markku

Trejnseminario por aktivuloj

Tempo: 4.-5.10.2003 (semajnfino)

Loko: Jyväskylän kristillinen opisto en Sul-
kula

Temo: Al kvalita komunikado – Laatu
viestintään – Kvalitet i kommunikationen
Partoprenantoj: Reprezentantoj de mem-
brosocietoj de EAF kaj unuopaj aktivuloj

Al membrosocietoj estos sendata invito al
la trejnseminario. Pliaj informoj de la pre-
zidanto aŭ de membroj de la projekta gru-
po.

Bonvenon! EAF

Turneo de Mikaelo Bronŝtein planata

Konata rusa bardo, Mikaelo Bronŝtein partoprenos la Internacian Festivalon (20a jubilea IF) en Kiel, Germanio 27.12.03-3.1.04. Post la festivalo li volonte turneos en Svedio, Danlando kaj Finnlando dum januaro 2004. La sekretario de EAF informis al Mikaelo, ke ni en Finnlando priraktas la aferon en la sekva estrarkunsido de EAF en aŭgusto kaj studos eblecojn inviti lin. Verŝajne eblas aranĝi viziton kaj turneon de Mikaelo ankaŭ en Finnlando januare 2004. Se vi aŭ via klubo volas havi lin kiel gasto, bonvolu kontaktiĝu kun la sekretario (informoj sur la paĝo 2). Certe preskaŭ ĉiuj finnlandaj esperantistoj konas la bardon Bronŝtein, kiu estas ankaŭ lerta prelegisto kaj esploristo ekz. pri verkoj de Puŝkin. Kaj en januaro estos bona okazo konatiĝi kun li pli profunde. (to)

Ne plu duboj pri la okazigo de UK en Pekino

Siatempe respondante al demando mi promesis ke mi tuj informos kiam la Estraro de UEA decidus ion novan pri la UK en Pekino 2004.

La Estraro faris neniun novan decidon. Ĝi nur konstatis ke post la proklamo de la Monda San-Organizo ke ĉesis SARS-epidemia en Ĉinio, ne plu ekzistas duboj pri la okazigo de la kongreso en Pekino, kiuj ekestis pro tiu epidemia. Tial la decido de la Estraro farita en januaro 2002 okazigi la 89-an UK 2004 en Pekino restas senŝanĝa.

Mi esperas havi venontjare sukcesan laboran kaj ĝuoplenan universalan kongreson kun partopreno de multaj esperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo. La partoprenantoj de la ĉi-jara universala kongreso povos jam en Gotenburgo aliĝi al la venontjara kongreso.

*Ivo Osibov, estrarano pri kongresoj
(aperis en la retlisto uea-membroj
la 12an de julio 2003)*

Lernejoj por Evoluo

“Bonvolu ricevi varmajn, afrikajn kaj marajn salutvortojn el Tozounmé.

Hieraŭ, la 28-an de junio 2003a, ni sukcesis veturigi kamione 96 geknabojn de OLE kun geinstruistoj ĉe la maro de Grand-Popo, sudokcidente de Benino, je 75 kilometroj de TOZOUNME. Ni vizitis la Blindulan Lernejon de Djanglanmé (Centre SILOE) survoje al Grand-Popo. La ĝojo de la infanoj estis ekstraordinara, ekceseĝa.” – Gaston HOUSSOU

Ĉi tiu letereto venas de lernejo por orfoj en Benino. Ĝi estas unu el la lernejoj, kiun UEA subtenas pere de Agado Espero por instrui infanojn ankaŭ en Esperanto por ke ili poste povu evoluigi sian landon.

Se vi volas kunlabori, bonvolu kontakti Agnes Geelen <agnes@esperanto.be>

Financa kontribuo povas esti sendata al UEA nome de Konto Espero kun la indiko ”lernejoj por evoluo”.

Pri venontaj kongresoj

En 2004 Beijing, aŭ Pekino, se oni insistas; en 2005 Vilnius (Vilno, Vilniuso). Konfirmite.

En 2006 eventuale en Florenco, kondiĉe ke la ĝenerala direktoro raportos pozitive post vizito ĉi-jara.

En 2007 principe en Jokohamo, refoje depende de pozitiva raporto de la ĝenerala direktoro post vizito ĉi-jara.

Pri la jaroj post 2007 estas ankoraŭ nenia decido.

*Trevor Steele
(de UEA-membroj-retlisto)*

Eventokalendaro de EAF

2003

- 29-31.8. Mazi I, kurso por komencantoj (alkeiskurssi, nybörjarkurs), Kimito (Euroscola-projekto de ELFI) + junulara semajnfino samloke (FEJO)
- 13-14.9. Aŭtunaj Tagoj en Raŭmo
- 15.9. Limdato por la fabelkonkurso por infanoj (Päätalo-instituto, Taivalkoski)
- 4-5.10. Aktivula seminario en Jyväskylä (EAF: Al kvalita komunikado)
- 18.10. Nomtago de Satu kun anonciĝo de la rezultoj de la fabelkonkurso (Päätalo-instituto)

2004

- 13-14.3.2004 Vintraj Tagoj en Jyväskylä
- 4.-9.7.2004 Kursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)
- 10-17.7.2004 IJK apud Kovrov, Ruslando (TEJO)
- 24.-31.7.2004 UK en Pekino, Ĉinio (UEA)
- Septembro: Aŭtunaj Tagoj (ĝisnunaj ideoj: ekskurso al Lesjöfors aŭ Iisalmi)

2005

- Februaro/marto: VT (ie en Finnlando)
- Somero: 25-jara jubileo de la IJK en Raŭmo (ideo por internacia evento)
- 23-30.7.2005 UK en Vilniuso, Litovio (UEA)

Aŭtunaj Tagoj de EAF

Suomen Esperantoliiton syyspäivät

Raumalla 13.-14.9.2003 en Raŭmo

Al kvalita komunikado – lanĉo en Raŭmo

Laatua viestintään – lanseeraus Raumalla

Kvalitet i kommunikationen – lansering i Raumo

Tämänvuotiset syyspäivät ovat ovella. Rauman historiallinen kaupunki ja sen innokkaat esperantistit odottavat meitä. Syyspäivien viikonloppuna Suomen Esperantoliiton Laatua viestintään -projekti tulee tutuksi, lisäksi Euroopan Esperantounionin (EEU:n) Brysselin tiedotuskeskuksessa työskentelevä *Dafydd ap Fergus* tulee kertomaan meille keskuksen toiminnasta ja näkemyksistään esperantoliikkeen julkisesta kuvasta. Käymme myös v. 1980 nuorisokongressin tapahtumapaikalla Rauman Yhteislyseon lukiossa eli RYL:ssä ja muistellemme tai kuulemme muistoja tuosta merkittävästä tapahtumasta. Ohjelmaamme kuuluu myös Vanhan Rauman kiertokävely, joka tietysti opastetaan meille myös esperantoksi. Tule sinäkin mukaan tunnelmaan!

La ĉi-jaraj Aŭtunaj Tagoj de EAF alproksimiĝas. Nin atendas la urbo Raŭmo kaj ĝiaj entuziasmaj esperantistoj. Dum la septembra semajnfino ni lanĉos la komunikadan projekton de EAF, aŭdos la informojn kaj opiniojn de *Dafydd ap Fergus* el Brusela Komunikadcentro de EEU (legu pli pri li sur p. 17) kaj rememoras la nostalgian kaj gravan IJK:n de 1980. Ĉio ĉi en la pitoreska kaj ĉarma atmosfero de Raŭmo, la urbo, kies malnova centro estas konata kiel mondheredaĵo de Unesco. Kompreneble en nia programo estos konatiĝo kun la stratoj kaj anguloj de la malnova urbo kaj same kompreneble niaj gvidantoj parolas Esperanton. Venu ankaŭ vi!

(Foto: Ilkka Santtila)



Jen ankoraŭ kelkaj praktikaj informoj. Tässä vielä käytännön tietoja päivien järjestelyistä.

Alveno kaj foriro – Aikataulu

Aŭtunaj Tagoj komenciĝos sabate per lunĉo je la 11.30 horo kaj finiĝos per posttagmeza kafo dimanĉe ĉirkaŭ 15.30. Eblas mendi tranokton pere de EAF ankaŭ por la antaŭa nokto kaj tiel konatiĝi sabate antaŭtagmeze kun la urbo kaj kun ĝiaj multaj malgrandaj vendejoj.

Syyspäivät alkavat lauantaina lounaalla klo 11.30 ja päättyvät lähtökahviin sunnuntaina noin kello 15.30. Majoituksen voi tilata järjestäjien kautta jo perjantaista, jolloin voi lauantaiamu-päivänä tutustua kaupunkiin ja sen lukuisiin pik-kuliikkeisiin.

Ejoj – Tapahtumapaikat

La ĉefa kunvenejo estas hotelo Cumulus, Aittakarinkatu 9 (26100 Rauma) telefono 02-837 821. La amasloĝejoj kun matracoj surplanke de la gimnastikejoj troviĝas tuj apude en Rauma Lyseon peruskoulu. Vespera manĝo kaj programo sabate estos en ĉarma malnova vilao Urhola ĉe la marbordo. Dimanĉa posttagmeza programo kaj adiaŭa kafo estos en Rauman Yhteislyseon lukio, la IJK-ejo de 1980.

Syyspäivät järjestetään pääosin hotelli Cumulusessa Aittakarinkatu 9 (26100 Rauma) puh. 02-837 821. Yhteismajoitus liikuntasalin lattialla patjoilla on viereisessä Rauman Lyseon peruskoulussa. Lauantai-illan ateria ja ohjelma ovat meren rannalla sijaitsevassa viehättävässä Urhola-huvilassa. Sunnuntain iltapäivän ohjelma päätöskahveineen järjestetään Rauman Yhteislyseon lukiossa.

Organizaj informoj

La aliĝilon bv. sendi al la oficejo kaj la monon bv. pagi al la konto de EAF Sampo 800017-230825. La kotizo dependas de la dato. La AT-paketprezoj (inkluzivas manĝaĵojn kaj tranokton) havas la saman prezon sendepende de la pagodato.

Pri aliĝilaj kaj monaj aferoj prizorgas Päivi Saarinen kaj Anna-Liisa Heikkinen, pri aliaj praktikaĵoj Tiina Oittinen, pri la programo ankaŭ Anna Ritamäki. Surlokaj prizorgantoj en Raŭmo estas Tuomo Grundström kaj Paula Niinikorpi (*paulaniinikorpi@hotmail.com*, tel. 040-527 4821). La kontaktinformoj de la aktivuloj troviĝas sur paĝo 2.

Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittautumislomake lähetetään liiton toimistoon ja maksut maksetaan liiton pankkitilille Sampo 800017-230825. Osallistumismaksun suuruus riippuu maksupäivästä. Syyspäiväpaketti on saman hintainen riippumatta maksupäivästä ja sisältää ruokailut ja yöpymisen.

Maksuihin ja ilmoittautumislomakkeeseen liittyvistä asioista huolehtivat Päivi Saarinen ja Anna-Liisa Heikkinen, muista käytännön järjestelyistä Tiina Oittinen, ohjelmasta myös Anna Ritamäki. Raumalla yhteyshenkilömme ovat Tuomo Grundström ja Paula Niinikorpi (*paulaniinikorpi@hotmail.com*, puhelin 040-527 4821). Muiden kuin Paulan yhteystiedot ovat sivulla 2.

Programo – Ohjelma

Sabato / Lauantai 13.9.2003

10.30 Malfermo de akceptejoj / Vastaanotto avataan (Cumulus)

11.30 Lunĉo / Lounas

12.30 Bonvenigaj vortoj / Tervetulosanat. Lanĉo de la projekto Al kvalita komunikado / Laatua viestintään -projektin lanseeraus (Anna Ritamäki).

La manifesto de Raŭmo / Rauman manifesti (Jukka Pietiläinen)

13.15 Dafydd ap Fergus: La Brusela Komunikadcentro de EEU / EEU:n Brysselin tiedotuskeskus

14.00 Paŭzo / Tauko

14.15 Dafydd ap Fergus: Informa strategio – fina venko, novspeca kulturo aŭ lingvaj

- rajtoj? / Esperanton tiedotusstrategiasta
 15.15 Kafo / Kahvi
 15.45 Rondirado en la malnova urbo /
 Vanhan Rauman kiertokävely (1 h)
 (Tuomo Grundström, Paula Niinikorpi)
 18.15 Transporto de la hotelo al la vesperejo /
 Kuljetus hotellilta illanviettopaikkaan
 18.30 Vespermanĝo kaj vespera programo /
 Illallinen ja iltaohjelma
 21.30 Transporto al la hotelo / Kuljetus
 hotellille

Dimanĉo / Sunnuntai 14.9.2003

- 8.00 Matenmanĝo / Aamiainen
 9.00 Matenpreĝo de KELF / Aamuhartaus,
 järj. KELF
 9.45 Dafydd ap Fergus, Anna Ritamäki, Jukka
 Pietiläinen: Kiel ni komuniku kvalite –
 interŝanĝo de ideoj / Miten viestiä laaduk-
 kaasti – ideointia
 11.30 Lunĉo / Lounas
 12.30 Transiro al Rauman Yhteislyseon lukio
 (la IJK-ejo) / Siirtyminen Rauman Yhteis-
 lyseon lukioon, v. 1980 nuorisokongressi-
 paikkaan
 13.00 Raŭmaj memoraĵoj de 1980 / Muistoja
 Raumalta v. 1980. Iamaj IJK-partoprenin-
 toj rakontas / Nuorisokongressin osallistu-
 jat kertovat. Televida filmo pri la IJK / TV-
 filmi nuorisokongressista. Konatiĝo kun la
 IJK-ejo / Tutustuminen nuorisokongressi-
 paikkaan
 15.00 Adiaŭaj kafo kaj vortoj / Kahvi ja
 loppusanat

Antaŭ AT vi povas konatiĝi kun la
 TTT-paĝoj de Raŭmo eĉ Esperante
 en <www.rauma.fi/esperanto>.

Rauman matkailun nettisivut ovat nyt
 myös esperantoksi. Käy katsomassa
 <www.rauma.fi/esperanto>.

ALIĜILO

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 13.-14.9.2003.

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Ret-adreso _____

Aliĝkotizo:

16 e ĝis la 25.8.2003 _____

20 e ekde la 25.8.2003 _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15
 jaroj sen aliĝkotizo kaj personoj loĝantaj ekster
 Finnlando laŭ interkonsento.

AT-paketoj:

La kunvena paketo 13.-14.9.

(tranokto, 2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo)

72 e hotelo Cumulus 2-lita ĉambro _____

92 e hotelo Cumulus 1-lita ĉambro _____

48 e amasloĝejo _____

45 e nur manĝopaketo _____

(2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo) _____

Kroma tranokto 12.-13.9.

30 e hotelo Cumulus 2-lita ĉambro _____

Pri kroma tranokto en amasloĝejo aŭ en 1-lita ĉam-
 bro en hotelo Cumulus, bv. kontakti la organiz-
 antojn.

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Deziroj koncerne tranokton aŭ manĝojn:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.

BONVENON!

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Syyspäiville
13.-14.9.2003.

Nimi _____

Osoite _____

Puh./fax/sähköposti _____

Osallistumismaksu:

16 e 25.8.2003 saakka _____

20 e 25.8.2003 jälkeen _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Alle 15-vuotiaat lapset ilman osallistumismaksua ja Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

AT-paketit:

Kokouspaketti 13.-14.9.

(majoitus, 2 lounasta, 2 kahvia, iltapala)

72 e hotelli Cumulus 2 h. huone _____

92 e hotelli Cumulus 1 h. huone _____

48 e koulumajoitus _____

45 e vain ruokailut
(2 lounasta, 2 kahvia, iltapala) _____

Lisäyö 12.-13.9.

30 e hotelli Cumulus 2 h. huone _____

Mikäli olet kiinnostunut lisäyöstä koulumajoituksessa tai 1 hengen huoneessa hotelli Cumulusessa, ota yhteyttä tapahtuman järjestäjiin.

Yhteensä maksettava EAF:n tilille _____

Toivomuksia majoituksen ja ruokailun suhteen:

Lähetä ilmoittautumislomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto ry

Siltasaarekatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki

Maksut EAF:n tilille: Sampo 800017-230825.

TERVETULOA!

Retpaĝoj de urbo Rauma esperante – la historia urbo prezentas sin

Dum la pasinta vintro kaj printempo oni tradukis la turismajn retpaĝojn de Raŭma en esperanton.

Raŭmana esperantoinstruisto Tuomo Grundström havis ideon pri la traduko kaj li transigis la tradukon al siaj kursanoj. Ĉi-jare estis nur unu lernanto, Paula Niinikorpi.

Laŭscie Rauma estas la plej unua urbo en Finnlando (kaj eble en la tuta mondo!), kiu havas retpaĝojn ankaŭ en esperanto.

En la retpaĝoj oni rakontas ekzemple pri vidindaĵoj, punto, lingvo de Raŭma kaj historio de Raŭma. Raŭma havas multajn interesajn karakterizaĵojn. Eble la plej fama estas Malnova Raŭma, kion UNESCO prenis al sia mondheredaĵlisto ĵus antaŭ la 550a naskiĝtago de la urbo. La originala urboparto estas unika ekzemplo pri malnova norda ligna urbo kaj ĝi estas ankoraŭ la plej vasta unueca konservita ligna urbareo en Nordio. La areo de Malnova Raŭma estas 30 hektaroj kaj tie estas ĉirkaŭ 600 konstruaĵoj kaj loĝdomoj kaj vendejoj. Loĝantoj estas tie ĉirkaŭ 750. La plej malnovaj loĝataj konstruaĵoj estas el la 17a jarcento. Urbstrukturo estas ĝis hodiaŭ konservinta ĝian mezepokan karakteron – stretaj kaj serpentaj stratoj, iuj tute mallarĝaj kaj ne-regulaj terenoj.

Punto estiĝis luksa ornamaĵo de eŭropaj kortegoj en la 16a jarcento. Jam en 18a jarcento puntfarado estis kutima metio de raŭmanoj. Multaj raŭmanoj faris la faman puntan de Raŭma. Oni kalkulis 600 puntistojn. De 1840 la puntfarado rimarkeble malmultiĝis, sed reviviĝis en komenco de la 20a jarcento. Dum la pasintaj jaroj ĉirkaŭ 150 raŭmanoj studis puntfaradon ĉiujare kiel ŝatokupon. Ekde jaro 1971 oni festas en Raŭma je fino de junio Puntan semajnon.

Dialekto de Raŭma (aŭ lingvo de Raŭma, kiel raŭmanoj mem nomas sian dialekton) estas unu el la sudokcidentaj dialektoj, kiujn oni parolas

en la provincoj Vera Finnlando kaj Satakunta proksime al Raŭma. Oni parolas la lingvon de Raŭma plej pure tamen nur en Raŭma. Ne ekzistas preciza informo pri la deveno de la lingvo de Raŭma, sed la pozicio de Raŭma kiel funkcia havenurbo influis lingvon. Dank' al maristoj, lingvo de Raŭma estas influita de la sveda kaj la angla, sed ankaŭ la estona, la rusa kaj la franca lingvo. La lingvo de Raŭma denove floras kaj prosperas post krizo en la mezo de la 20a jarcento, ekzemple en raŭmana gazetaro, libroj kaj teatro. Ĉiujare Hannu Heino tradukas la somermezan numeron de urba magazino Uusi Rauma.

Vizitu www.rauma.fi/esperanto por havi pli multe da informojn pri Raŭma.

urba Rauma - Microsoft Internet Explorer
 Adresoj | http://www.rauma.fi/esperanto/historio_de_rauma.htm
 RAUMAN KAUPUNKI
 o ain Raum
 Turismo
Historio de Rauma
 Tradicioj de Rauma kaj njartrafikoj aludas al milaraj komercaj rilatoj kun aliaj baltnaraj landoj. La urbo evoluis iam post iam en la fino de Mezepoko, sed pri la evoluo ne konserviĝis dokumentoj. Jam en la mezo de la 14a jarcento oni konstruis la unuan katolikan templon de Rauma, la Preĝejo de Sankta Triunuo kaj evidente en la sama jarcento oni fondis la franciskanan monaĥejon. La komerca loko formis kulturen centron.
 La 17an de aprilo en 1442 Karl Knutsson, kavaliro, konfirmis per sia sigelo komercajn rajtojn al raŭmanaj burĝoj kaj la samajn avantaĝojn, specialajn rajtojn kaj liberecojn kiel aliaj turkumanaj burĝoj havis. La fondodokumentoj de Rauma lasis certajn rajtojn al la burĝoj, sed jam antaŭ tio Rauma estis la komerca kaj ekklesia centro dank' al la monaĥejo. Franciskanoj loĝiĝis al Rauma plej malfrue en komenco de la 15a jarcento post forlaso de kastelo de Vredenberg en Sunajoki. Du jarojn post la unua privilegio leŭono reĝo Kristoffer nen donis ordonojn pri organizo de la administraco de la urbo.
 La kvanto de la privilegiaj leŭbenoj, aldonitaj en 1461 kaj 1476, reflektas la aktivadon de la urbanoj. Oni persistis je la ricevita rajtoj kaj oni petis konfirmon kiam la reĝinto Sanktaĝis kaj oni akceptis la rajtojn en la vivteno. En la komenco de la sekva jarcento estis konkurado pri komercaj rajtoj kun Uvika, "ankaŭlo" de la najbara urbo Pori. Rauma estis jam tiam marborda havenurbo, kiu peris varojn al konsumaj centroj en sudo. La kresko de la impostoj ĝis la mezo de la 16a jarcento montras tion.
 Reĝo Gustavo Vasa kaj liaj konsilistoj pensis, ke kelkaj grandaj centoj konfirmas la rolon de al multaj autonomaj urboj. Tio

Dafydd ap Fergus

Dafydd ap Fergus, aŭ David Ferguson angle, estas ĝenerala sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio kaj gvidanto de la Brusela Komunikadcentro. Li naskiĝis en Kimrio en 1968 kaj studis filozofion kaj politikajn sciencojn inter alie en



Oxford kaj Vieno. Ekde 1995 ap Fergus loĝas en Bruselo laborante kiel radioĵurnalisto ĉe la Flandra Internacia Radio kaj poste kiel ĉefredaktoro de komercrevuo. En 1999 li lernis Esperanton dum semjanfina rapidkurso de Nederlanda Esperanto-Junularo. Komence de la jaro 2002, li eklaboras por la Komunikadcentro de Universala Esperanto-Asocio kaj Eŭropa Esperanto-Unio. Ĉefa tasko de ap Fergus estas instigi al pli profesia kaj efika inform- kaj politikagado por Esperanto cele al pli bona publika bildo de la lingvo. La Komunikadcentro jam atingis diversajn konkretajn rezultojn instigante al la publikigo de centoj da artikoloj kaj al ĉiam pli konkreta politika agado por la lingva egal-eco. Li parolos konkrete kaj praktike pri kiel plibonigi informadon al neesperantistoj.

Estraro kunvenis

La estraro de EAF kunvenis por sia kvina kunsido en 2003 la 24an de majo en Hotelo Cumulus, Raŭmo. Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oitinen, Päivi Saarinen, Markku Saastamoinen kaj Tuomo Grundström.

La planado de Aŭtunaj Tagoj okazonta en Raŭmo estis grava temo de la kunsido kiu daŭris inter 10.00 kaj 13.20 kun unuhora paŭzo por rigardo de AT-ejoj. Tiu planado estis daŭrigata dum la samtaga projekta kunveno kiun partoprenis krom la jam menciitaj ankaŭ Paula Niinikorpi.

La kunsidoj de la projekta grupo estas aparte protokolitaj kaj la protokoloj estos distribuataj same kiel la estraraj protokoloj (al estraranoj, vicestraranoj, kasisto kaj revizoroj). La grupo rajtas fari decidojn kadre de la projekta buĝeto.

La estraro akceptis pagi la kostojn por la ĉi-jara dua kunsido de la vortara grupo 10.5.2003 en Helsinko. EAF pretas pagi vojaĝkostojn por du pliaj kunsidoj ĉi-jare kaj ĝojas ke la grupo aktivas.

Por Vintraj Tagoj 2004 la estraro akceptis la proponon de la Esperanto-klubo de Jyväskylä pri la datoj: 13.-14.3.2004. EAF havas ofertojn de Jyväskylän Kristillinen opisto aŭ hotelo Priimus.

Por AT 2004 EAF ricevis inviton de Esperantoklubo de Iisalmi. Alia ideo estas viziti la svedan Esperantodomon en Lesjöfors kombinite kun seminario de Sveda Esperanto-Instituto.

EAF ricevis informon ke la emerita profesoro Lehto faros dum tri jaroj libron pri la fratoj Väisälä kaj en ĝi estos menciita ankaŭ grava rolo de esperanto en la vivo de prof. Väisälä.

La estraro dankeme aprobis Taneli Huuskonen kiel novan registran prizorganton.

La estraro decidis, ke dum 2003 Esperanto-lehti estas sendita koste de EAF al Turun kirjakaŭfo kaj al Turun Sanomat, kultura redaktoro. La proponoj venis de lokaj esperantistoj. Por 2004 la estraro kun la projekta grupo pristudos

laŭ kiuj principoj sendi la gazeton senpage al aliaj redaktoroj kaj instancoj en Finnlando; en Turku ĝis nun la sendado (kiun prizorgis la loka societo) rezultigis kelkajn kontaktojn.

Sub la punkto financoj la estraro notis kun ĝojo la pozitivan rezulton de VT en Lahti, entute 725 eŭrojn. EAF pagis la membrokotizon de UN-asocio por 2003: 60 e.

Napola E-societo Napola Esperanto-Asocio petis ke EAF, por antaŭenigi la eldonon de esperanta verketo pri la vivo kaj verkaro de Dante Alighieri, sendu finnlingvan leteron al Itala Instituto de Kulturo en Finnlando. La estraro konstatis, ke se iu EAF-estrarano trovos la tempon por tio, la afero estas subtenita de la estraro. (Poste Raita Pyhälä legis la libron Danteskaj Itineroj kaj skribis al la instituto.)

La vicprezidanto estis intervjuita de regiona gazeto Alueutiset (eldono de Espoo). En Turun Sanomat aperis artikoleto pri lokaj societanoj kaj esperanta literaturo. (Ambaŭ artikoletoj estas senditaj al EAF-arkivo en la oficejo.)

La estraro ne decidis pri la dato de la sekva kunsido, sed poste estis sendita invito por la 23a de aŭgusto je la 11a en la oficejo.

Kiu pagis?

Kiu pagis 12.06.2003 al konto 800017-230825 "JÄSENMAKSUT 2003" 35.00 eŭrojn? (erare venis kun indiko ke paginto estas Suomen Esperantoliitto). Bonvole kontakti kasiston Anna-Liisa Heikkinen eaftkasisto@esperanto.fi aŭ letere al Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinko.

Ĉu vi ĉeestis en IJK 1980?

Apartan bonvenon al Aŭtunaj Tagoj! EAF volas instigi vin traserĉi viajn memoraĵojn de tiu tempo. Por AT kunpaku kion vi trovos: fotojn, kongreslibron, diversajn foliojn de prelegoj aŭ kunsidoj, rezultoj de arta kreado dum IJK ...!



Ni en 1987 kun tri junaj esperantistoj, kies nomojn ni bedaŭrinde ne notis tiam. Maldekstre la sporta halo Wisla.

Päivi kaj Tiina denove en Krakovo

En la jubilea jaro 1987 ni partoprenis la 43an IJK:n en Pollando. Ĝi estis aranĝita en la urbo Krakovo, fama pri sia historio, kiu rilatas ankaŭ kun Finnlando. La julia semajno tiam estis tre ege varma kaj same varma estis ankaŭ la atmosfero de la IJK. Ni ŝvitis kaj naĝis kaj konatiĝis kun tiama pola fenomeno: niema – nenio.

Tute alia estis la vetero, kiam ni la duan fojon vizitis la saman urbon en Suda Pollando. Komence de decembro 2002 la vetero estis vintra kaj eĉ ni norduloj iam kaj tiam malvarmegis, kiam blovis la glacia vento tra la stratoj. Sed la IJK-areon ni tamen trovis sufiĉe facile kaj vizitis post 15

jaroj denove la sportan halon Wisla, la ĉef-okazojon de IJK. Tie ludis nun junuloj korbopilkon kaj eblis al ni eniri kaj rigardi la ejon. Poste ni ankoraŭ vizitis la najbaran hotelon, kiu tiam estis Holiday Inn kaj nun havis tute alian nomon. La fenomeno 'niema' tute malaperis kaj ni volonte trinkis varmajn trinkaĵojn kaj memoris la IJK-tempon.

*Tiina Oittinen kaj Päivi Saarinen
(ĉiamaj subtenantoj de FEJO/TEJO)*

La sporta halo Wisla en 2002, Tiina starante antaŭ ĝi kaj Päivi malantaŭ la fotilo.



Sur la nokta ĉielo


Unu de la proksimume sep steloj, kiuj en suda Finnlando videblas eĉ meze de somero estas Altair. Kiam la noktoj en aŭgusto komencas esti mallumaj, ĝi estas en suda direkto, kaj tiam komencas esti videblaj du aliaj steloj en ĝia proksimumo, Tarazed supre dekstre kaj Alshain malsupre maldekstre. Kune tiu triopo sur la ĉielo estas facile konebla. Ili formas la plej eminentan parton de konstelacio Aquila (finne *Kotka*). Tiu latina nomo estas konata por birdobservantoj signifante aglon.

La preciza pozicio, kiel oni rigardas la ĉielan aglon esti, varias. Laŭ mi la plej bona maniero vidi la figuron de aglo estas, ke la triopo Tarazed-Altair-Alshain estas ĝia kapo, eble precize tiel, ke Tarazed estas la supro de kapo, Altair

estas okulo kaj Alshain estas pinto de la beko. Ĝia korpo estas do malsupre dekstre ĉe la stelo Deneb Okab kaj la flugiloj etenditaj en ambaŭ flankoj. Tiel oni povas imagi, ke la aglo flugas el horizonto supren kaj rigardas al malsupra maldekstra direkto.

Oni facile rimarkas, ke multaj nomoj de steloj komenciĝas per *al*. Tio havas la klarigon, ke plejparto de ili venas de la araba lingvo, kaj la difinanta artikolo en la araba estas *al*. Oni neniel regule transformigis la nomojn kaj do en kelkaj nomoj tiu artikolo aperas, en aliaj ne.

Kompreneble ja estas, ke la araboj en klarvetera klimato ĉiam havis pli riĉan tradicion en rigardado de steloj ol eŭropanoj. Nur proksimume dudek steloj ŝajnas havi en internacia uzo



Suda ĉielo ĉe komenco de mallumo en fruaŭtunaj noktoj, ekzemple 15.8. je 22 kaj 31.8. je 21. La Lakta Vojo, kiun en la bildo ilustras la pli hela regiono, direktiĝas de supre al suda-sudokcidenta horizonto. Reale la Lakta Vojo estas nebuleca strio, kiu ne havas precizajn limojn. La plej brilaj en Finnlando videblaj partoj de la Lakta Vojo estas ĉe la "vosto" de Aquila ("la aglo") kaj en Scutum ("la ŝildo").

Raportoj pri Japanio

HORI Jasuo, Raportoj el Japanio 6
167 p., Libroteko Tokio, 2003

La sesa kolekto de raportoj pri Japanio enhavas 25 ĉapitrojn. En dekkvino de la ĉapitroj la aŭtoro priskribas japanajojn (kutimoj, vortoj, manĝaĵoj), en kvino da ĉapitroj li klarigas historiajn kaj nunajn rilatojn inter Japanio kaj Ĉinio, same kiel inter Japanio kaj Nord-Koreio, kaj en kvar ĉapitroj li priskribas lernejan aŭ universitatan vivon kaj ĵusajn ŝanĝojn en edukado. Pliaj temoj estas sporto kaj proprakosta libroeldonado. Aldone la kolekto enhavas mapeton, ĝisdatigitajn statistikon kaj historieton pri Japanio kaj mempriskribon de la aŭtoro.

Antaŭ la Universala Esperanto-Kongreso en Jokohamo estas interese konatiĝi kun la diversaj ortografioj uzataj en Japanio, kun la plej kutimaj japanaj familiaj nomoj kaj ties deveno. Fakte, neniu ĉapitro estas neutila. Estus bone (re)legi ankaŭ la 5 antaŭajn raportkolektojn aŭ almenaŭ plurajn ĉapitrojn el ili.

Unuj temoj, ekzemple la ĉefaj novaĵoj en 2002 aŭ eksa ministro pri eksterlandaj aferoj (Tanaka Makiko), supozeble rapide malaktualiĝos, aliaj temoj eble ĉiam restos konindaj, ekzemple japanaj manĝaĵoj, Sumoo-luktistoj kaj la japana pluva sezono. La lingvo de la raportoj estas relative simpla kaj facile komprenebla. Kelkaj frazoj kaj esprimoj povas surprizi aŭ pensigi ne-japanan leganton sed nur tre malmultaj, kaj tio ne ĝenas.

La celo de sinjoro Hori estas kontribuo al intergenta komprenemo kaj pacamo. Li ĉiam deziris fariĝi per-esperanta, por-paca esperantisto, kaj li sukcesis. Li mem ilustras siajn librojn. Se vi legos, kion li diras sur paĝo 2 pri la sur-kovrila desegnaĵo, vi malkovros pli profundan signifon de la bildo. Legante Raportojn el Japanio vi kvaŝaŭ ricevas pli malpli intimajn leterojn de la lando de la sunleviĝo. Se ĝi vin interesas kaj vi ne ankoraŭ tro scias pri ĝi, certe plaĉos al vi la legado.

Saliko

nomon, kies origino estas en latino aŭ la greka, dum arabdevenaj nomoj estas almenaŭ pli ol cent. Ĉiuj kvar steloj en Aquila, kiuj havas nomon, estas ekzemploj de arabaj.

Nomo Altair venas de arablingva esprimo *al nasr al tair*, kiu signifas “la fluganta aglo”. Tie oni vidas, ke la koncepto de aglo en la konstelacio estis pruntita inter kulturoj, kvankam en mallongigo de la nomo forgesiĝis la parto *nasr*, kiu signifas aglon, kaj konserviĝis nur *tair*, kiu signifas flugantan. Deneb Okab tradukiĝas por esti “vosto de aglo”, iom kontraŭante mian percepton, ke tiu stelo reprezentas ne voston, sed mezkorpon. La nomoj Alshaid kaj Tarazed laŭ mia scio ambaŭ signifas iuspecan akcipitron, do

eble iam oni pensis la konstelacion esti ne unu birdo, sed aro da birdoj.

En Aquila kaj malsupre de ĝi videblas la plej brilaj partoj de la Lakta Vojo kiujn oni en Finnlando povas vidi. La plej brilaj partoj de ĝi restas de ni norduloj kaŝitaj malantaŭ la suda horizonto. Se oni volas ĉi tie plejeble bone vidi la Laktan Vojon, indas trovi lokon kun plejeble malferma kaj malluma suda horizonto kaj observi fruaŭtune tuj komence de plena mallumo. Pli malfrue la Lakta Vojo iom post iom turniĝas en malpli videblan pozicion.

Mikko Mäkitalo

Muut lehdet

Rakkautta ja esperantoa

Helsingin Sanomien Kuukausiliitteessä heinäkuussa 2003 esiteltiin viisi rakkaustarinaa otsikolla ”Hyvää, suomalaista rakkautta”. Yksi niistä oli kertomus Aino ja Kaarle Salmisen tapaamisesta ja suhteesta 1930-luvulla, ”Aino Salmisen pitkä odotus”.

Pari muutti tutustumisen ja häiden jälkeen Kokemäelle Porin lähelle. Jutussa mainitaan, että ”He olivat aina menossa, opiskelivat esperantoa ja kävivät kävelyillä”. Heille syntyi Kokemäellä tytär.

Kaarlo Salminen osallistui talvisotaan ja kaatui Talin taisteluissa talvella 1940. Hänen ruumistaan ei kuitenkaan löydetty.

Aino Salminen näki heinäkuussa 1944 unen, jossa hänen käteensä ilmestyi esperantonkielinen lause. Hän ymmärsi sen sisällön, että ”Minä voin täällä hyvin, Kaarlosi.”

Aino Salminen muutti Helsinkiin ja perusti vaatetusliikkeen. Hän odotti pitkään, että Kaarlo palaisi, eikä mennyt naimisiin.

Valamon esperantokurssi

Helsingin Sanomissa 17.7.2003 julkaistiin kotimaan osastolla noin neljäsosasivun kokoinen juttu EAF:n esperanto-kurssista Valamossa heinäkuussa 2003. Jutussa esiteltiin kurssilaisia ja heidän perustelujaan sille, miksi he osallistuvat kurssille. Jutussa kerrotaan esperanton lyhyt historia kahdessa lauseessa ja esitellään Passportservo -järjestelmä. Esiin tulee myös Valamon luostari ja sen ilmapiiri kurssipaikkana.

Jutun yhteydessä lehti julkaisi taustajutun, jossa toimittaja Satu Konttinen keskustelee kurssin opettajan Atilio Rojaksen kanssa esperantoksi ja kuvaa kolmen oppitunnin sisältöä. Toimittaja kertoo joitakin esperanton kieliopin perusteita, mm. verbioppia, sananmuodostusta sekä lukusanoja. Lopussa Satu Konttinen toteaa, kuinka muut kurssilaiset ovat saaneet tietää hänen elämästään ja asumisestaan, kun aiheet

ovat olleet oppitunnin aikana esillä.

Kielen opetuksen hinta

Turun Sanomissa julkaistiin mielipidepalstalla sunnuntaina 20.8.2003 Unkarilaisen diplomi-rakennusinsinööri Otto Haszpran kirjoitus ”Yhteisen kielen hinta” kielten käytöstä kansainvälisissä yhteisöissä ja kielenopetuksen kustannuksista. Budapestin teknillisen ja taloustieteen yliopiston professori Haszpra vertaili artikkelissa englannin ja esperanton oppimista, siihen kuluva aikaa ja opetuksen kustannuksia.

Aluksi hän esitti, että kielipalvelujen kustannukset kansainvälisille järjestöille ovat vähäiset verrattuna siihen, jos kokonaisuudelle kieliryhmälle opetetaan toista kansallista kieltä kaikille pakollisena. Tätä ei esitetä kustannuksissa. Haszpran mielestä kansainvälisessä yhteistyössä käytetty kieli ei saisi viedä tilaa kunkin oman äidinkielen käytöltä ja sen tulee olla nopeasti ja helposti opittavissa.

Hän arvioi englannin ja esperanton opetuksen menoja vertailemalla kustannuksia Saksassa ja koko EU:n alueella, kun kummankin alueen väestöstä on vuosittain 1,5 prosenttia uusia kielenopiskelijoita. Haszpra laski, että englannin opetuksen ja opiskelun arvo vuodessa olisi Saksassa 12 miljardia euroa ja esperanton osalta sama luku olisi 1,3 miljardia euroa. Vastaavasti EU:ssa englannin opetus maksaisi 73 miljardia vuodessa ja esperanton opetus EU:ssa toisi kuluja 8,3 miljardia. Tässä on huomioitu, että Englantia ei tarvitse opettaa EU:ssa sitä äidinkielenään puhuville. Kirjoittaja muistuttaa myös siitä, että esperanton käyttö kansainvälisessä yhteistyössä olisi tasa-arvoista, koska se ei olisi kenenkään äidinkieli. ”Esperanto pakollisena yhteisenä toisena kielenä (oman äidinkielen jälkeen) ei olisi este minkä tahansa muiden kielen opiskelulle.”

Koonnut Jukka Noponen

Pri finna flaŭro

(Legu nur se vin interesas nomoj de floroj)

De sudo al nordo Finnlando longas 1157 kilometrojn. *Blanka anemono* (vuokko), floro kiu simbolas la plej sudan provincon, ne kreskas en meza aŭ norda Finnlando, kaj arktaj plantoj de Laplando ne povas kreski en la sudo. Laplandon simbolas *trolia* (kullero) printempe, kaj aŭtune ĝin beligas ruĝiĝintaj *arktostafiloj* (riekonmarja), kiuj kovras la terenon sub orflavaj betuletoj. Botanikistoj kaj ĝardenistoj dividas nian landon en ok klimatajn kreskozonojn, sed ene de iu zono povas troviĝi regionaj klimatoj, pli aŭ malpli varmaj ol tipa klimato de tiu zono. Kreskozonoj dependas ne nur de nordeco/sudeco sed ankaŭ de alteco¹, de lagoj, montoj, marĉoj² kaj ventoj. Inluas ankaŭ la longeco de la tago. La tagnokta lumo de la nordo favoras longtagajn plantojn³ kaj ankaŭ igas la aromojn de la aromherboj⁴ pli fortaj.

(¹korkeus, ²suot, ³pitkänpäivän kasvit, ⁴mausteirtit)

Pli frue ol blanka anemono en suda Finnlando floras *blua hepatiko*⁵, kiu profitas de abunda lumo, antaŭ ol arbofolioj ombras la teron. Aliaj printempaj floroj estas flavaj *tusilago*⁶, *leontodo*⁷, *kalto*⁸.

En marĉaj lokoj floras modesta helruĝa *andromedo*⁹. Nur ekde kelkdeko da jaroj en la ĝardenoj kaj parkoj pompas *krokusoj*, *narcisoj*, *tulipoj* kaj aliaj bulbofloroj importitaj de Nederlando. Florantaj *violegoj*¹⁰ (*ĝardenaj pensoj*¹⁰) estas aĉetataj de la florkultivistoj kaj plantataj en parkojn kaj ĝardenojn por havi pli da koloro tuj post la vintro. Kelkaj homoj kvazaŭ pilgrimas por trovi ruĝfloran *dafnon*¹¹ en la arbaro. (Tiu ĉi planto estas protektata.) Fine de majo kaj komence de junio ekfloras blankaj *padusoj*¹² kaj *sorpujoj*¹³, poste floras *konvalo*¹⁴, *miozoto*¹⁵, kaj en ĝardenoj *pomarboj*¹⁶, blanka *viburno*¹⁷, *sambuko*¹⁸, lila *siringo*¹⁹, malgranda flava *papavo*²⁰ kaj grandega ruĝa papavo. En junio floras ankaŭ

blankaj *erioforo*²¹ kaj *ledumo*²² kiuj ŝatas malseketajn ejojn. Oni povas vidi vastajn kampojn de flava *kolzo*²³. *Linon*²⁴, kies floretoj estas bluaj, oni tre malofte vidas en nuntempa Finnlando.

(⁵sinivuokko, ⁶leskenlehti, ⁷voikukka, ⁸rentukka, ⁹suokukka, ¹⁰puutarhaorvokki, ¹¹näsiä, ¹²tuumi, ¹³pihlaja, ¹⁴kielo, ¹⁵lemmikki, ¹⁶omenapuut, ¹⁷heisi, ¹⁸selja, ¹⁹syreeni, ²⁰unikko, ²¹tupasvilla (”niittyvilla”), ²²suopursu, ²³rypsi, ²⁴pellava)

Tre atenteme ni rigardas la floradon de beroj: *mirtelo*²⁵, *frago*²⁶, *vaksinio*²⁷, *kamemoro*²⁸, *riboj*²⁹ kaj *grosoj*³⁰, ĉar ilin ĉiam minacas noktaj frostoj. *Oksikokoj*³¹ kaj *framboj*³² ne estas same minacataj kaj priatentaj.

(²⁵mustikka, ²⁶mansikka, ²⁷puolukka, ²⁸muurain, ²⁹lakka, ³⁰hilla, ³¹herukat, ³²karviaiset, ³¹karpatlot, ³²vadelmat)

Komenciĝas julio kaj plena somero: blankaj *lekantoj*³³, blankaj kaj ruĝaj *trifolioj*³⁴, bluaj *veronikoj*³⁵, *vicioj*³⁶ kaj *kampanuloj*³⁷, *purpuraj cir-sioj*³⁸, *geranioj*³⁹, *geumoj*⁴⁰, flavaj *ranunkoloj*⁴¹, *hieracioj*⁴², multaj specioj de *kruciferoj*⁴³. Kelkloke la herbejo ŝajnas kvazaŭ blanka ŝaumo pro *ulmario*⁴⁴, *galio*⁴⁵, *stelario*⁴⁶ aŭ *antrisko*⁴⁷. En pinarbaro bonodoras delikata malalta *lineo*⁴⁸. En malprofundaj lagetoj videblas *meniantoj*⁴⁹, *nufaroj*⁵⁰ kaj *nimfeoj*⁵¹, sur malsekaj bordoj troveblas brunaj spikoj de *tifeo*⁵² kaj flavaj *iridoj*⁵³, sur pli seka bordo *salikario*⁵⁴.

(³³päivänkakkarat, ³⁴apilat, ³⁵tädykkeet, ³⁶virnat, ³⁷kellokukat, ³⁸ohdakkeet, ³⁹kurjenpolvet, ⁴⁰kellukat, ⁴¹leinikit, ⁴²keltanot, ⁴³ristikukkaiset, ⁴⁴mesiangervo, ⁴⁵matara, ⁴⁶tähtimö, ⁴⁷koiranputki, ⁴⁸vanamo, ⁴⁹raate, ⁵⁰ulpukka, ⁵¹lumme, ⁵²osmankäämi, ⁵³kurjenmiekat, ⁵⁴rantakukka)

La kreskosezono estas mallonga. Jam en aŭgusto la plej multaj sovaĝaj plantoj dissemas siajn grajnoj, sed ni povas ankoraŭ ĝui floradon de helruĝaj *epilobioj*⁵⁵ kaj *kalunoj*⁵⁶, de bluaj *cejanoj*⁵⁷.



Esperanto-maailmastani

Kiso – Suudelma

Joskus 1980-luvulla ostin Mendoservolta pienen taipuisan ”naarmuuntumattoman” levyn, Kiso, jossa oli kolme esperantoksi laulettua sävelmää. Levyn oli kustantanut Fondumo Esperanto. Laulu *Hellyys* on alkuperäinen esperantonkielinen eestiläisen Hilja Deresin runo ja *Kun mun kultani tulisi* sanat ovat Kantelettaresta, sen on suomesta kääntänyt unkarilainen K. Kalocsay, siis molemmat esperanto-maailmassa varsin tunnettuja henkilöitä. Kappaleet on laulanut esperantoksi pienin ääntämisvirhein yksi aikansa suosikeista Heli Keinonen. Kolmas kappale on Raamatun *Sulamittaren tanssi*, sen on laulanut oopperalaulaja Kari Tamminen, kääntäjää ei ole mainittu. Kappaleet on säveltänyt M.A. Numminen. Levyn tekemisessä on ollut mukana myös Seppo Hovi ja Martti Pokela.

Itse pidän erikoisesti kansanmusiikkityyppeistä *Hellyys* ja *Kun mun kultani tulisi* -kappaleista. Vaikka en ole koskaan ymmärtänyt Nummisen määkimistä, myönnän että mies on lahjakas ja monipuolinen taiteilija.

Esperantolehdessä 5/2002 Riitta Hämäläinen kirjoitti haastattelun Nummisesta ja hänen tuotannostaan siltä osin, jossa esperanto jotenkin mainitaan. Mielestäni olisi kannattanut mainita

myös Kiso-levystä. Sen sisältöön on vaikuttanut sekä esperantomailman että Suomen huipputa. Levy on ennen kaikkea Suomen esperantoliikkeen historiaa.



Liettualainen Asorti on perheyhtye, isä Edvard, äiti Jelena ja poika Edvardas. Yhtyeen Jelenan ja Edvardin vierailusta viime kesänä maassamme kirjoitettiin runsaasti Esperantolehdessä 4/2002. Hyvä niin. Itsekin kuuntelin heidän esityksiään Börje Erikssonin pihalla Orimattilassa. Kyllähän heitä mielellään kuunteli ja katseili, mutta...

Liettualaiset kävivät mm. Lahdessa. Olin heille apuna kun kävimme parissa musiikkikaupassa, lisäksi Jelena työnsä puolesta yritti solmia kontaktia lahtelaiseen rock-yhtyeeseen, joka olisi halukas yhteistyöhön hänen kotikaupunkinsa vastaavan kanssa. Saimmekin pari internet-osoitetta. Lopuksi kutsuin heidät kotiini syömään. Sain kiitokseksi Asortin CD-levyn, jossa on kappaleita heidän ohjelmistostaan.

Olen katsellut ja kuunnellut kappaleita tietokoneeni avulla. Katsellut todella, sillä osa kappaleisiin tehdystä kuvasta liikkuu kuin televisioruudulla. Nykyajan ihmeitä!

▷ En parkoj kaj ĝardenoj floras *tropeoloj*⁵⁸, *lilioj*, *astilboj*⁵⁹, *floksoj*⁶⁰, *hortensioj*, *potentiloj*⁶¹, sed jam minacas ilin nokta frosto. En septembro-oktobro oni estas bonŝanca, se oni hazarde trovas iun malfruiĝantan *akileon*⁶².

(⁵⁵horsmat, ⁵⁶kanervat, ”eriko” ei ole Suomen kanerva, ⁵⁷ruiskaunokit, ⁵⁸krassit, ⁵⁹jaloangervot, ⁶⁰leimukukat, ⁶¹hanhikit, ⁶²kärsämö)

Se vi konas la latinan nomon de la planto, la esperanta nomo al vi estas facila, sed se vi deziras nomi precizan specion (niittyleinikki, rönsyleinikki ktp), vi uzu la tutan latinan nomon. Nur

kelkaj niaj plantoj havas propran esperantan nomon (kissankello = *rondfolia kampamulo*; käenkukka = *kukulflora sileno*). Kelkaj plantoj havas duoblan nomon (kissankäpäälä = *katpiedo, dioika antenario*). Se vi mem neniam interesigis pri finna flaŭro, ne devigu vin lerni eĉ unu nomon!

En la libroservo de la gotenbarga UK estis havebla maldika libreto de Sten Johansson pri la sveda floraro kun la latinaj kaj svedaj kaj esperantaj nomoj. Indas havigi ĝin al si, se la nomoj vin vere interesas.

Saliko

Nyt tullaan tämän jutun pääasiaan. Kun olen kaikessa rauhassa tutustunut Asortin musiikkiin, olen alkanut pitää siitä. Todella hyvä, että esperanto-maailmasta löytyy tällainenkin yhtye, jonka musiikki sopii varttuneen kuulijan – ja katselijan – makuun. Olen päättänyt ostaa heiltä uuden CD-levyn seuraavassa esperantokongressissa Ruotsissa, jos mahdollista.



Kesällä 2002 olin esperanton puitteissa Unkarissa. Kierrellessämme Budapestissa kadulla meidät yhdytti jonkinlaiseen kansallispukuun pukeutunut tyttö, joka jakoi tiedotteita Unkarin valtion kansantanssiryhmän konsertista. Ryhmän tiedettiin olevan todella hyvä, niinpä muuttamat ryhmästäme ostivat lipun, vaikka se maksoi lähes 140 markkaa. Konsertti tapahtui Budan puolella Corvinterillä yhdessä monista vanhoista historiallisista rakennuksista. Sali oli täynnä erimaalaisia turisteja.

Kerrotaan, että sosialistisen hallinnon aikana valtion ylläpitämiä tanssiryhmiä oli kolme, joissa jokaisessa suurempi tanssijajoukko kuin tänä päivänä. Nykyisessä ryhmässä oli 25-30 tanssijaa ja lisäksi 5-miehinen orkesteri. Näin seinämainoksen, joka kertoi, että turistikautena ryhmällä oli kuutisenkymmentä peräkkäistä esitys-

tä, siis lähes joka ilta. Ohjelmisto oli rakennettu kuvaamaan kansantansseja historiasta nykypäivään. Tanssijat olivat pukeutuneet hyvin värikkäisiin asuihin, mikä tietysti miellytti silmää.

Olen aina pitänyt unkarilaisesta kansantanssista sen rytmikkyyden tähden. Se eroaa valtavasti pohjoismaalaisista kansantansseista. En yritäkään kuvailla ryhmän esitystä. Totean vain, että yllättäen jälkepäin mieleeni eniten jäi kumma kyllä nykyaikainen kansantanssi, jossa tanssijat eivät olleet pukeutuneet värikkäisiin kansallispukuihin.

Olen nähnyt muutamia suomalaisia nykypäivän kansantansseja. En pitänyt niistä. Mutta unkarilaisten ammattilaisten esitys oli mahtava, täynnä kiihkeää, äärimmäisen hyvin hallittua liikettä, jaloin, käsin. Ei ole sanoja kuvaamaan sitä. Tiedän kyllä, että osa esityksistä oli sovitettu näyttäväksi, mutta ei se mitään. Mietin voiko modernia osaa edes sanoa kansantanssiksi, mutta ei sekään mitään.

Siinä hurmion hetkenä tuli mieleen ajatus, että tämän jälkeen en halua enää nähdä kotimaisia amatöörien esityksiä. Jälkepäin olen kyllä lieventänyt ajatustani.

Esa Lång

duplustro



Jes, majoro – diris Setälä

La somero de 1941 estis plena de historiaj okazoj. Nefo kaj Arvikolo kune laboris en elektra firmao, post la lerneja jaro. Ambaŭ posedis novan biciklon, kio multe helpis en la laboro, kiu ĉefe konsistis el transportado de iloj kaj materialoj inter la firmao kaj diversaj laborlokoj. Tiam la knaboj tute ne komprenis, kia feliĉo estis posedi velocipedon kun novaj, nedifektaj pneŭmatikoj. Nur unu semajnon daŭris la stato de laboristo, kun salajro kaj ĉio. En la vilaĝo, kie Arvikolo pasigis la militvintron, formiĝis nova infanteria bataliono, en kies stabo li nun fariĝis stafeto. Sed ankaŭ tio havis nur tre mallongan daŭron. Iun nokton alvenis aro de oficiroj, kiuj transprenis la batalionon, kiu formariĝis en la luma mezsomera nokto. En la sekvanta mateno restis nur malplenaj dormolokoj, en la loka popollernejo, kaj la stabo, kies ilaron kaj paperojn fortransportis grupeto da soldatoj. Telefone la patro 'ordonis' tujan hejmenrevenon, kaj la triopo nova biciklo, Lukki, la flavpeltulo, kaj ilia posedanto, sin trovis en ĉevalvagono survoje hejmen. Patrino kaj fratineto hejme atendis, sed la patro jam forvojaĝis al loko nekonata, kune kun sia bataliono. Oni sciis, ke nova milito certe ekestos. Jam batalis Germanio kontraŭ Sovetio, kaj iun matenon jam faligis bombojn la ruĝ-stelaj aviadiloj. Nia lando ree estis en la stato de milito.

Post kelkaj tagoj alvenis du alvokoj. Ĉe proksima areo-stabo oni kolektis biciklojn por la armeo. Nun devis la knaboj, kune kun multaj aliaj, forlasi la brilnovajn veturilojn al nekonata sorto. Kontraŭ atesto, nature. Sed la alia alvoko estis multe pli amara. Ankaŭ tre neatendita ĝi estis. En proksima kazerno oni "varbis" hundojn taŭgajn por milita uzo. Nun ankaŭ Lukki ricevis sian kunvokan ordonon, same kiel la patro. Oni

volis dresi ĝin stafethundo. Multaj hundoj kolektiĝis tie, kaj multegaj larmoj falis. Sed kontraŭ atesto, nature.

La stratoj de la urbo tuj aliiĝis. La plejmulto de stratpubliko estis maljunaj personoj aŭ virinoj. La vidaĵon de la urbaj stratoj penetriĝis tute nova elemento: germanaj maristoj. Kaj unu tagon tra la stratoj marŝis batalpreta germana divizio. Bone ekipita trupo. Ĝi eĉ havis propran orkestron, kiu lerte muzikis ĉe la Bulevardo.

La lernejo komenciĝis en normala tempo, el la instruistoj parto forestis, viroj. La lernejestro foje aperis en la uniformo de artileria kapitano. Sed denove forestis. Nur malofte flugis bombaviadiloj al la ĉielo de la urbo. Malhellumon oni nun ne ordonis.



Oni starigis flagstangon en la korto de Fondumo Esperanto, en Iirislahti. Solena okazo. Estis eĉ tostite, per mieltrinkaĵo, nature. Tamen el ĉampanaj glasoj. Oni babilis pri la rekomenciĝo de la milito. Setälä diris, ke ankaŭ li havis taskojn en la armeo, taskojn de inĝeniera majoro. Estis iel malfacile imagebla kombinaĵo: la fama pacifisto kaj militaj fortoj. Setälä tamen asertis, ke li tre motivite laboris, kaj bone komprenis la emon de finnoj iel rekompenci la ofendon de la vintra milito. Oni bone memoris la tempon, kiam multaj familioj sendis patron kaj plurajn filojn al la hazardaj sortoj de la tempo. Arvikolo nur sendis tri familianojn: sian patron, sian hundon kaj novan biciklon... Sed la ideo de armeon servanta Setälä mirigis. Ĉu vere...? Jes, en la rango de inĝeniera majoro, diris Setälä.

Arvikolo

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispohantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609
☎ kari.kettunen@pp1.inet.fi
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti.
☎ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ♦ Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkelä, (Elli Husso) Porrassalmekatu 27 B 51, 50100 Mikkelä.
- ♦ Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla
☎ matti.wallius@pp.inet.fi
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstie 37, 37500 Lempäälä,
☎ lauliu@sci.fi)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Suomen opettajien esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki.
☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmak-

sut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2003 on 18 • sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 •. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Mietinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2003**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12


Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 •	1/1 sivu/paĝo 50 •
1/2 sivua/paĝo 60 •	1/2 sivua/paĝo 30 •
1/4 sivua/paĝo 40 •	1/4 sivua/paĝo 20 •

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki



Egaleco kaj paco per Esperanto Esperanto – Tasa-arvoa ja rauhaa

Raita Pyhälän suomentama Lars Forsmanin esperanton alkeiskurssi on osoittautunut suosituksi oppimateriaaliksi ja ensimmäinen painos myytiin loppuun keväällä. Nyt kirjasta on otettu 2. painos, minkä lisäksi kirjan tekstejä on saatavissa myös kasetille luettuina.

Kirjan hinta on 10 euroa ja kasetin 5 euroa ja niitä voi tilata osoitteesta:

Suomen Esperantoliitto ry, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh. 09-715538 (päivystys tiistaisin klo 17-19, muulloin voi jättää viestin puhelinvastaajaan) tai sähköisesti: mendoj@esperanto.fi. Postitse toimitettaessa hintaan lisätään lähetyskulut.

Edelleen saatavana Suomen Esperantoliiton toimistosta myös:

Taskusanakirja suomi-esperanto-suomi (8,50 e)

Kalevala (10 e)

Muminvalo (12 e)

Kie boacoj vagadas (12 e)

Ynnä muuta – kysy lisää em. osoitteista!

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy lokakuun alussa. Jutut 15.9.2003 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en la komenco de oktobro. Artikoloj ĝis 15.9.2003 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: eafllehti@esperanto.fi.